



JARRAPORTO

KALENDARA JARO 2022

Enkonduko

Estimataj legantoj! Mi havas la honoron disponigi al vi la raporton pri la funkciado kaj agado de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo en la jaro 2022.

La pasinta jaro estis defia pro pluraj kialoj. Unuflanke, grandaj partoj de la mondo eliris el la pandemio de KOVIM, kiu dum du jaroj preskaŭ komplete disrompis nian tradician agadon. Aliflanke, la mondon ekhantis novaj danĝeroj, precipe pro la februara invado de pliaj partoj de Ukrainio fare de la rusia armeo. Tio rememorigas nin pri la fakto, ke en pluraj lokoj de la mondo okazas militoj kaj ke niaj statutaj celoj: solidareco kaj rajtrespekta socio estas gravaj partoj en konstruado de paco.


Por nia organizo la plej frapa okazaĵo de la jaro estis la nericevo de la administra subvencio. Tio influis multajn partojn de nia agado. La financa krizo tamen ne senaktivigis nin ĝisfunde – pri la okazintaj agadoj legu en tiu ĉi jarraporto. Mi deziras al vi agrablan legadon!

Tobiasz Kubisiowski
Ĝenerala Sekretario de TEJO 2022–2023

Esperantujo, la 2-an de marto 2023



Parto 1. Funkciado



Estraro 2021–2022

La Estraro estas la ĉefa plenuma instanco de la organizo. En 2022, pro demisioj de tri estraranoj de la mandato 2021–2022, la Komitato alelektis tri novajn estraranojn.

- La 26-an de februaro 2022, kadre de eksterordinara komitatkunveno, la Komitato alelektis **Tyron Surmon** por la posteno de senofica estrarano.
- La 16-an de aprilo 2022 la Komitato per reta voĉdono alelektis **Nicolas Kasolene (Nickson)** kaj **Tobiasz Kubisiowski** kiel novajn senoficajn estraranojn.

Ĉiuj alelektitaj estraranoj estis poste reelektitaj por la mandato 2022–2023.

Estraro 2022–2023

Kadre de eksterordinara komitatkunveno en julio 2022, la 23-an kaj la 24-an de julio 2022
la Komitato elektis rete novan Estraron por la mandato 2022–2023:


- **Albert Stalin Garrido** - Prezidanto: Edukado, Scienco, kaj Kulturo; Kongresoj; Rilatoj kun UEA & ILEI; Volontuloj
- **Valentin Ceretto Bergerat** - 1a Vicprezidanto: Eksteraj Rilatoj; Projektoj kaj Subvencioj
- **Tyron Surmon** - 2a Vicprezidanto: Informado kaj "Kontakto"; Retaj Eventoj; Arkivado; Rilatoj kun UEA
- **Tobiasz Kubisiowski** - Ĝenerala Sekretario: Adoleska Agado, Sekretaria Rondo, Volontuloj
- **Wilson Foo Yu Kang** - Kasisto: Financoj
- **Nickson Kasolene** - Estrarano: Talento; Daŭripoveco
- **Luana França** - Estrarano: Egaleco; Pasporta Servo
- **David Ruíz Sánchez** - Estrarano: Aktivula Trejnado; Patronoj
- **Patricio Agustín Iglesias** - Estrarano: Landa kaj Faka Agado; Junaj Amikoj de Esperanto

La ekfunkciinta Estraro akceptis [Realigplanon por la mandato 2022-2023](#).

Estrarkunsidoj

La Estraro kunsidis hibride (kun partoprenoj ĉeesta kaj reta) dufoje:

- de la 20-a ĝis la 22-a de majo 2022 en Prago,
- de la 27-a ĝis la 28-a de aŭgusto 2022 (tuj post IJK) en Rotterdamo – temis pri transdona kunsido, kiun ĉeestis estraranoj de ambaŭ mandatoj por transdoni la necesajn informojn kaj sciojn.



Krome, la Estraro kunsidas regule rete, ĉiun trian semajnfinojn. La tagordoj kaj protokoloj estas dissendataj pere de la retlisto de la Komitato post ĉiu kunsido. Ekde oktobro 2022, la protokoloj estas publikigataj en resumita formo.

Malferma Horo de la Estraro

Kadre de la hibrida estrarkunsido en Prago, la 22-an de majo 2022, la Estraro okazigis retan Malferman Horon de la Estraro.

En la postaj monatoj, pro malgranda intereso, la Estraro decidis ne daŭrigi la okazigadon de Malfermaj Horoj. La Komitato kaj la membroj daŭre povas kontakti la Estraron pere de aliaj medioj (retpoŝte, per la komitata retlisto kaj per neoficiala babilgrupo en Telegramo).

Komitato

La 1-an de junio 2022 ekoficis nova konsisto de la Komitato.

- Komitatanoj A estis nomumitaj laŭ la membronombroj deklaritaj de la Landaj kaj Fakaj Sekcioj kaj surbaze de la kotizoj, kiujn ili pagis.
- Naŭ komitatanoj B estis elektitaj dum voĉdonado de la Individuaj Membroj de TEJO.
- La 1-an de decembro 2022, post voĉdonado inter la Individuaj Membroj de TEJO, elektiĝis pliaj tri komitatanoj B.



Cirkuleroj

La aktivuloj de TEJO – estraranoj, komitatanoj, komisiitoj, volontuloj kaj oficistoj – regule raportas pri sia agado publike. Iliaj raportoj aperas kiel monata cirkulero dissendata pere de la komitata diskutlisto. Ĉiuj arkivaj numeroj de 2022 estas legeblaj en [Centra Reto](#).

Cirkulero n-ro 211 por decembro 2022

Al cirkulero n-ro 211 por decembro 2022 kontribuis 34 personoj el 60 rajtintoj:

Estrarano

Kontribuis (9/9):

- Tobiasz Kubisiowski – Ĝenerala Sekretario
- Albert Stalin Tancinco Garrido – Prezidanto
- Tynon Surmon – 2-a vicprezidanto
- Luana Araújo de França – Estrarano
- David Rulz i Sánchez – Estrarano
- Nicolas Kasolene (Nickson) – Estrarano
- Valentin C. B. – 1-a vicprezidanto
- Patricio Agustín Iglesias – Estrarano
- Wilson Foo Yu Kang (Ričsano) – Kasisto

Kontribuintoj Nekontribuintoj



Komitatano

Kontribuis (14/26):

- Manuela Burghilea – Komitatano Ĉ
- Karina Oliveira – Komitatano Ĉ
- Michal Matúšov (KuboF Hromoslav) – Komitatano A (EUROKKA)
- Ines Kahin – Komitatano A (Francio)
- Lucca Catini Lanzi – Komitatano A (Brazilio)
- Wojciech Oreszczuk (Wojtek) – Komitatano B

Kontribuintoj Nekontribuintoj



Financoj

La financojn de la organizo grave influis la manko de la administra subvencio en 2022. Laŭ la funkciado de la subvencio, ĝi estas por la tuta kalendara jaro, tamen la decidon pri ĝia ricevo (aŭ ne) la organizoj ricevis nur fine de aprilo. Pro tio kelkaj jam okazintaj sindevigoj de TEJO multe pezis en la financa stato de la organizo. En majo la Estraro preparis reviziitan buĝeton, kiu bedaŭrinde devis inkluzivi sufiĉe grandan deficiton. La financa stato ne permesis al la nova Estraro transpreni ĉiujn agadojn de la pasinta mandato kaj signife limigis la pagatajn homfortojn de la organizo. Pro la granda signifo de la administra subvencio, la buĝeto por la jaro 2023 enhavas du scenariojn: kaze de ricevo kaj nericevo de la subvencio.

Pli detalaj informoj pri la financoj troviĝos en aparta financa raporto.

Oficistoj

En 2022 por TEJO laboris kvin oficistoj:

- Giorgio Nikolov (Ariel) – komunikado (partatempe, ĝis junio 2022);
- Carlos Pesquera Alonso – subvencipetado (partatempe, tutjare);
- Spyros Papadatos – subvencipetado (partatempe, tutjare, ĝis la fino de 2022);
- Mia Nordentoft – AKSO (tuttempe, tutjare);
- Vincent – AKSO (partatempe, tutjare);
- Clément Baleyte (tuttempe kun UEA, ekde februaro 2022 ĝis la fino de 2022).

Pro la nericevo de la administra subvencio por 2022, la Komitato rekomendis al la Estraro prokrasti la plilongigon de la oficistaj kontraktoj ĝis post la decido pri la administra subvencio por 2023. Pro la jam ekzistantaj devoj de TEJO ne eblis fari tion tute. Fine de la jaro la kontraktoj de Spyros kaj de Clément ne estis plilongigitaj.

Volontuloj

En 2022 en TEJO volontulis jenaj personoj:

- Livia Noghi (Rumanio) – oktobro 2021–oktobro 2022;
- Wojciech “Wojtek” Oreszczuk (Pollando) – oktobro 2021–oktobro 2022;
- Lenka Doškářová (Ĉeĥio) – januaro–decembro 2022;
- Leonardo Popov (Francio) – februaro–aŭgusto 2022;
- Emmanuel “Manu” González (Hispanio/Dominika Respubliko) – ekde oktobro 2022;
- Jeanne Grimaud (Francio) – ekde septembro 2022;
- Jonas Löser (Germanio) – ekde novembro 2022.

Leonardo estis volontulo de EKC en Tuluzo, kiu danke al la kunlaboro TEJO-EKC venis al Roterdamo por mallonga periodo. Ĉiuj aliaj volontuloj partoprenis la programon de Eŭropaj Solidaraj Korpusoj, kunfinancatan de Eŭropa Unio.

Volontuloj

- Volontuloj laboris en la Centra Oficejo en Roterdamo kaj loĝis en la Volontula Domo, kiu troviĝas ĉe la sama strato en Roterdamo.
- Ekde la nova mandato de la Estraro, la estraraj kunordigantoj pri la volontuloj estas Albert (Prezidanto) kaj Tobiasz (Ĝenerala Sekretario). Ĝis la fino de 2022, la surloka kunordiganto estis Clément.
- Ekde oktobro 2022, ĉiuj elirantaj volontuloj estas intervjuataj (surloke aŭ rete) de almenaŭ du estraranoj, laŭ la elekto de la koncerna volontulo. Tio celas resumi iliajn spertojn kaj plibonigi la programon por la venontaj volontuloj.

Rilatoj kun ILEI

La jaro 2022 kunportis grandan plivigliĝon de la rilatoj kun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). En majo 2023, UEA, ILEI, kaj TEJO, reprezentita de la estrarano respondeca pri edukado Albert Stalin Garrido, interkonsentis pri triflanka kunlaboro pri edukado, scienco, kaj kultura agado.

La kunlaboro rilatas ankaŭ al la organizado de la kongresoj de TEJO kaj ILEI, kiu komune okazos en Lignano Sabbiadoro (Italio) en aŭgusto 2023. TEJO kaj ILEI formis apartan Komunan Kongresan Komisionon (KKK), kiu konsistas el reprezentantoj de ambaŭ organizoj kaj kiu celas al plej bona organizado de la evento.

Landaj kaj Fakaj Sekcioj kaj Individuaj Membroj

En la jaro 2022 TEJO havis 50 Landajn Sekciojn kaj 2 Fakajn Sekciojn. La 13-an de julio la Komitato akceptis la aliĝon de nova Landa Sekcio – Indonezia Esperantista Junulara Organizo (IEJO).

Fine de la kalendarajaro 2022 TEJO havis 1068 Individuajn Membrojn.

Rilatoj kun Patronoj

Tra la jaro volontuloj de TEJO liveris naskiĝtagsalutojn al patronoj. Estraranoj kaj aliaj aktivuloj laboris tra la jaro varbante novajn patronojn kaj donacantojn dum la Universala Kongreso kaj aliaj Esperanto-renkontiĝoj.





Parto 2. Agado

Edukado, Scienco kaj Kulturo

La komisiono pri Edukado, Scienco kaj Kulturo, mallonge ESK, konsistis fine de 2022 de la jenaj aktivuloj:

- Snehaja Venkatesh (Barato) – Ĝenerala Komisiito (komisiito pri Scienco ĝis septembro 2022);
- Espoir Ngoma Kasati (D.R. Kongo) – Komisiito pri Edukado;
- Òscar Hernández Rodríguez (Katalunio) – Komisiito pri Scienco;
- Rogier 'Roĉjo' Huurman (Nederlando) – Komisiito pri Kulturo.

La respondeca estrarano en la mandatoj 2021-2022 kaj 2022-2023 estas Albert Stalin Garrido; vicrespondecas Patricio Agustín Iglesias.

Edukado, Scienco kaj Kulturo

Tutjare estis vigla scienca agado. En 2022, TEJO daŭrigis la serion de retaj sciencaj prelegoj:

- “Lingvoj de Rusio” de Aleksandr Blinov,
- “Krei Poŝtelefonajn Ludojn” de Wilson Foo Yu Kang,
- “Maŝinlernado” de Jacob Nordfalk,
- “Kiel Nia Cerbo Komprenas Lingvaĵon?” de Michael Vrazitulis,
- “Biosensilo” de Ali Aulia Ghozali.

La Komisiono intencas plu daŭrigi la prelegserion en 2023.



tejo scienco

BIOSENSILO

ESTONTECA TEKNOLOGIO PLI VERDA KAJ MEDIAMIKA



30-an de julio 2022
13:00 UTC

Ali Aulia Ghozali

The poster features a dark background with a glowing purple and blue molecular or cellular structure. The text is primarily in white and green. A central photograph shows a man with glasses and a light-colored jacket. The overall design is modern and scientific.

Edukado, Scienco kaj Kulturo

Okaze de Retoso 2022, ESK organizis KonSciU: Konkurson por Junaj Sciencistoj kaj Universitatoj, partnere kun UEA kaj ILEI. Entute 8 konkursanoj prezentis rapide siajn esplorojn antaŭ juĝkomisiono, kiu taksis iliajn prezentokapablojn.

La konkurson gajnis:

- Tymoteusz Smoliński (1-a premio),
- Frank van Hertrooij (2-a premio),
- Abhinav Varma (3-a premio).

La gajnintoj ricevis interalie diplomojn, TEJO-ĉemizojn kaj senpagan membrecon en ILEI en 2023.

A vibrant pink poster for the KonSciU competition. The title 'KonSciU' is written in large, bold white letters at the top. Below it, the subtitle 'Konkurso por junaj Sciencistoj kaj Universitatoj' is written in smaller white text. The date and time '27a Novembro 14 UTC' are displayed in white. A central image shows a microphone on a stage with a hand holding a pen over a document. At the bottom right, the text 'Aliĝu nun!' is written in white, followed by the URL 'bit.ly/konsciu22'. The background features faint white icons of a book, a laptop, and a globe, along with a network diagram of dots and lines.

KonSciU
Konkurso por junaj Sciencistoj
kaj Universitatoj

27a Novembro
14 UTC

Aliĝu nun!
bit.ly/konsciu22



Edukado, Scienco kaj Kulturo

Sub la gvido de la komisiito pri Scienco Òscar Hernández Rodríguez, kunlabore kun la Interesgrupo pri Daŭripoveco, fondiĝis laborgrupo por krei esperantlingvan tradukon de la resuma raporto pri klimatsanĝo de la Interregistara Spertularo pri Klimatsanĝo (IPCC).

La laboro de la grupo daŭras ankaŭ en 2023 kaj ĝi serĉas kunlaborantojn pri tradukado kaj aliaj taskoj.



Kultura Agado: June kaj Kune

La unua originala muzikalo en Esperanto, “June kaj Kune”, estis prezentita la 26-an de aŭgusto 2022 okaze de la 76-a IJK en Westelbeers, Nederlando. La muzikalon verkis Rogier “Roĉjo” Huurman, Karlos’ Pesquera Alonso, Benjamin Álvarez Rodríguez kaj Lauris Lepoix.

La surscenigon financis Erasmus+ (23.445 EUR) kadre de la programo KA152; realigis ĝin TEJO partnere kun Kataluna Esperanto-Junularo, Germana Esperanto-Junularo, EUROKKA, Itala Esperanto-Federacio kaj Pola Esperanto-Asocio. Ĝi subtenis la partoprenon de 34 junuloj el diversaj mondopartoj, interalie Novzelando, Kostariko, Brazilo kaj Pollando.

La videoregistraĵo de “June kaj Kune” premieris rete dum Retoso 2022.

Kultura Agado: June kaj Kune

LA UNUA MUZIKALO EN ESPERANTO, PER ESPERANTO KAJ PRI ESPERANTO!



JUNE kaj KUNE

BALDAŬ VIDEBLA EN IU IJK
PROKSIME DE VI!

26 AŬGUSTO 2022
IJK 2022 - Westelbeers, Nederlando

Landa kaj Faka Agado: Konsisto

La komisiono pri Landa kaj Faka Agado konsistis fine de 2022 de jenaj aktivuloj:

- Arya Bhaskara Ferduzi (Indonezio): Komisiito pri LA en Azio kaj Oceanio;
- Abyssinie “Gobi” Anohon (Benino): Komisiito pri LA en Okcidenta Afriko;
- John Magessa (Tanzanio): Komisiito pri LA en Orienta Afriko;
- Lucca Lanzi (Brazilo): Komisiito pri Landa Agado en Suda Ameriko;
- Lenka Doškářová (Ĉeĥio): konstanta volontulo;
- Emmanuel “Manu” González (Hispanio/Dominika Respubliko): komisionano;
- Aušrinė Tamošiūnaitė (Litovio): komisionano;
- Joshua Moss (Novzelando/Aotearoo): komisionano.

La respondeca estrarano ĝis aŭgusto estis Albert Stalin Garrido. Poste la respondecon transprenis Patricio Iglesias, kun la helpo de Albert Stalin Garrido kaj Nicolas Kasolene.

Landa kaj Faka Agado: KJK

La komisiono okazigis virtuale tri Kontinentajn Junularajn Konferencojn (KJK-j) por:

1. Azio kaj Oceanio (aprilo),
2. Ameriko (junio),
3. Afriko (novembro, kadre de Retoso).

Tiuj eventoj estis grava oportuno por junuloj por interkonatiĝi kaj interŝanĝi spertojn kun homoj el la samaj mondopartoj.

Landa kaj Faka Agado: Novaj sekcioj

La komisiono, en kunordigo kun la laborgrupoj, antaŭenigis la aliĝpetojn de la jenaj junularaj asocioj:

1. IEJO (Indonezia Esperantista Junulara Organizo),
2. SEJ (Senegala Esperanto-Junularo),
3. VMEO (Vikimedia EO).

Ĝi ankaŭ donis subtenon al novaj grupoj en Litovio (LEJO),
Novzelando/Aotearoo (ALEJ) kaj Ĉilio (ĈESPI).



Landa kaj Faka Agado: AOK kaj AKE

Kunlabore kun la komisionoj de UEA pri Afrika kaj Azia agadoj, pluraj junuloj kunorganizis la 8-an AKE (Afrikan Kongreson de Esperanto) kaj la 10-an AOK (Azian-Oceanian Kongreson), kaj rete, kaj ĉeeste.

Ili helpis okazigi viglajn junularajn programerojn kaj komencis plani ontan agadon en la regiono.



La 10-a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto

3-6 Novembro 2022 Busano, Koreio

Temo: Novan Vojon por la Esperanto-Movado
post Kronviroza Krizo

Landa kaj Faka Agado: Kurso por hispanlingvanoj

Kunlabore kun pluraj organizoj, la komisiono lanĉis diversajn iniciatojn por faciligi la integriĝon en la Esperanto-movadon de la lernantoj de la kurso por hispanlingvanoj de KEL (Kolombia Esperanto-Ligo), celante tiel plifortigi la junularan agadon en Ameriko kaj Hispanio.

Krome, en kunlaboro kun la Komisiono pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (ESK) de TEJO, la blogo Scivolemo, Juna Esperantistaro Argentina (JEA) kaj Argentina Esperanto-Ligo (AEL), ĝi ankaŭ okazigis hibridajn blokojn dum la Argentina Kongreso de Esperanto en oktobro, kie junuloj el ĉiuj kontinentoj interŝanĝis konojn kaj spertojn.



Junaj Amikoj de Esperanto

Dum Retoso okazis neformala sinprezento pri la membrokategorio *Junaj Amikoj de Esperanto*, kie oni babilis pri la celoj por 2023. Oni ankaŭ establis kontakton kun la respondeca estrarano de UEA pri Amikoj de Esperanto por komenci kunordigi komunan laboron en la fako inter ambaŭ organizaĵoj.

Kongresoj: IJK 2022

Post dujara paŭzo, en 2022 okazis surloka Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Ĝi okazis en Westelbeers en Nederlando, ekde la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto. Partoprenis ĝin 233 personoj el 30 loĝlandoj.



fotis Ivo Miesen

Kongresoj: IJK 2023

En 2022 estis anoncote ankaŭ, ke IJK 2023 okazos en Lignano Sabbiadoro, Italio, komune kun la 56-a ILEI-Kongreso de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto. La novkreita Kongresa Komisiono (KK), internacia teamo de TEJO respondeca pri la organizado de la IJK, komencis kunlabori kun ILEI kaj lokaj organizantoj.


Nova sistemo por aliĝoj kaj pagoj estis lanĉita pere de la Kongresa Sistemo de AKSO. La retpaĝaro viziteblas ĉe <http://ijk2023.tejo.org>.



Kongresoj: RETOSO 2022

[Retoso](#) estas la reta evento de TEJO. Unuafoje okazinta de la 2-a ĝis la 5-a de aprilo 2021 kiel memstara evento, TEJO organizis ĝin denove de la 24-a ĝis la 27-a de novembro 2022, kune kun UEA, kadre de la 3a Virtuala Kongreso. De la 1468 aliĝintoj de la Virtuala Kongreso, 376 estis en la aĝkategorio de TEJO, kaj tiel estis konsiderataj kiel partoprenantoj de Retoso. Ili venis de 72 landoj kaj ĝuis 50 programerojn dum 4 tagoj, inkluzive la unua prezento de la muzikalo “June kaj Kune”, filmita dum IJK 2022, kaj la [sciencia konkurso](#).

La vivelsenditaj programeroj [spekteblas](#) en nia jutuba kanalo, kaj la aliaj prelegoj baldaŭ publikiĝos tie. TEJO planas okazigi Retoson denove en 2023, ĉu kadre de la VK, ĉu memstare, aŭ ambaŭ.



Arkivado

Arkivado estas nova fako de TEJO. Pro la baldaŭa translokiĝo de la Centra Oficejo, TEJO devas (kaj paralele UEA faras same) decidi kion fari kun la propra *arĥivo*. Tyron Surmon faris [plenan katalogadon](#) je la fino de 2021, kaj ekrespondicis pri ĝi en la Estraro en marto 2022.

La ĉefa atingo de la fako estis sukcesa skanado de ĉiuj 443 numeroj de *Kontakto* kaj *TEJO Tutmonde* (video pri la projekto [spekteblas](#) en nia YouTube-kanalo), nun [alireblaj ĉe UEA](#). Oni ankaŭ komencis skani *La Juna Vivo*, la sekvan plej gravan revuon en la historio de TEJO.

Ĉar UEA ne ankoraŭ vendis la Centran Oficejon, la fina decido pri la eventuala nova hejmo de la arĥivo ankoraŭ ne devas esti farita.



Centoj da numeroj de Esperanto-revuoj libere alireblaj! - Enmovade #12

1.3K views • 9 months ago

Kontakto

[Kontako](#) estas la ĉefa revuo de TEJO ekde 1963. 2022 estis la unua plena jaro por la nova redaktoro Paweł Fischer-Kotowski, kiu transprenis la postenon fine de 2021.

La ĉefa defio de la jaro estis strebi solvi la malfruiĝon, kiu komenciĝis dum la transdona tempo inter la redaktoroj. Kvankam 5 numeroj publikiĝis dum la kalendarajaro 2022 (kiam kutime estas 6), pro la ekzistanta malfruo de la pasintjaraj numeroj, la lasta en 2022 estis nur 2022:3.



Eksteraj Rilatoj: Forumo Junulara Eŭropa (FoJE)

En 2022 FoJE okazigis siajn kutimajn 2 statutajn eventojn:

- KoMem (Konsilion de Membroj) en Bruselo en majo, [pri kiu raportis Valentin](#);
- Ĝeneralan Asembleon (ĜA) en Albanio en novembro, [pri kiu raportis Manu kaj Jeanne](#).

Kadre de aŭ ĉirkaŭ la agado de FoJE okazis ankaŭ [Eŭropa Junulara Konferenco](#), kunsido de [membroorganizo pri statuŝanĝo](#) kaj [kunsido pri la Eŭropa Ĉarto pri junularo kaj demokratio](#).

Eksteraj Rilatoj: UNOY

Okaze de la okazigo de IJK 2022 en Nederlando, TEJO invitis UNOY, kies ĉefsidejo estas ĝuste en Nederlando (Hago), veni viziti la kongreson. Pro tio 3 oficistoj de UNOY veturis de Hago al la IJK-ejo lundon, la 22-an de aŭgusto, t.e. la tagon kiam okazis trejnado pri eksteraj rilatoj kaj la Movada Foiro. Ili do utiligis ambaŭ okazojn por prezenti sian organizon, agadojn kaj celojn, kaj ankaŭ ĝui iom da etoso de la junulara Esperanto-movado.

Projektoj: Erasmus+

Kiel ĉiujare, TEJO pretigis plurajn projektproponojn kadre de la programo Erasmus+ financata de Eŭropa Unio. Unu el la sukcese okazigitaj projektoj estis *LAVIPOY*, danke al kiu la projekto de Esperanta muzikalo ricevis financon subtenon. La muzikalo estis preparita antaŭ kaj dum IJK 2022, kaj prezentita en la lasta vespero de la kongreso. La mutita registraĵo estis rezentita kadre de RETOSO 2022 kaj restas [spektebla en YouTube](#).



Aktivula Trejnado

La Komisiono pri Aktivula Trejnado kunigas homojn kiuj volas trejni aliajn TEJO-membrojn pri tre diversaj temoj aŭ volas lerni kiel trejni aliajn. En 2022 kadre de AT agis la jenaj personoj:

- Ines Kahin – estrara respondeculo (septembro 2021–aŭgusto 2022),
- Leonardo Popov – TEJO-volontulo (februaro–aŭgusto 2022)
- David Ruíz Sánchez – komisiito pri AT (septembro 2021–aŭgusto 2022),
poste estrara respondeculo (ekde septembro 2022),
- Manu Guaroa – TEJO-volontulo (ekde oktobro 2022).



Aktivula Trejnado

La agadon de AT forte vigligis la TEJO-Trejnistoj kaj la kunlaboro kun la Komisiono pri Projektoj kaj Subvencioj. En 2022 ni sukcesis realigi multajn internaciajn projektojn kun trejnistinklina fokuso tra diversaj landoj:

- [Esplorante Demokration - Junuloj revigligas niajn demokratiojn post-pandemio](#) (kadre de IJF en Italio, 13-17 aprilo 2022),
- [Trejnu la Novan Trejniston - TnT](#) (17-26 junio 2022 en Moissac, Francio),
- [Lingvoj por Demokratio - Revivigado de plurismaj demokratioj kaj lingvaj rajtoj](#) kaj [Esplorante Inkluzivon - Atingo de vere inkluzivaj socioj](#) (kadre de IJK en Nederlando, 21-25 aŭgusto 2022),
- [Seminario pri Mastrumado de Organizoj - Revivigado de junulara agado postpandemie](#) (kadre de KKPS en Nederlando, 28 oktobro-2 novembro 2022).

AKSO

La jaro 2022 alportis signifan evoluon en la stato de la administra sistemo AKSO. Kvankam la laboro ne atingis la finan lanĉon, la jaro 2022 portis kelkajn gravajn atingojn:

- lanĉon de beta-testado,
- laboron pri la transmigrado de la enhavo de la retejoj al la nova sistemo,
- sukcesan lanĉon de la kongresa sistemo kadre de AKSO, kiu funkcias por IJK 2023 kaj plifaciligas la aliĝojn, pagojn kaj administradon por la kongreso de TEJO en 2023.

Kvankam daŭras negocado inter TEJO kaj UEA pri la livero de la fina produkto, la Komitato de UEA en decembro 2022 konsentis rezervi en la buĝeto por 2023 la sumon de 18 mil eŭroj por la finpretigo kaj teknika prizorgo de AKSO.



tejo

TEJO, januaro-marto 2023

Kontribuis:

estraj respondeculoj de la mandato 2022–2023

Ĉefkompilis:

Tobiasz Kubisiowski (Ĝenerala Sekretario)